

Heinrich Heine,  
Akvoveturo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ĉe l' masto min apogis mi  
kaj nombris ĉiun ondon.  
"Adiaŭ nun, patrujo vi!<sup>2</sup>  
Mi volas en la mondon."

Ekbrilis la fenestroj de  
la karulina domo,  
rigardis streĉe mi, sed ne  
mansvingis iu homo.

Vi larmoj, retenigu vi,  
por ke mi ne blindigu!  
Malsana kor', pro tic ĉi  
doloro ne rompiĝu!

*Traduko de la Germana poemo "Wasserfahrt" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1984.*

*MR-167-1 / Arg-208-1367 (2012-11-26 07:56:15)*

---

<sup>2</sup>aŭ:  
"Adiaŭ, kara vi patrii!"